
# Vertikale

Dumonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

Numero 8
Aprilo 1995



- konsistigis 6 komisionojn:
Informado (Wim De Smet);
Ekster-FEL-aĵoj (Alex Humet);
Instruado (Johan Van Eenoo);
Financoj (Roland Rotsaert);
Membraro (Ingrid Lievens);
E-domo Antverpeno (Jacques Schram).
Wim De Smet preparas regularon pri la komisionoj.
- Eŭropaj elektoj:
aperis teksto en ĵurnalo; politikaj partioj kaj kelkaj kandidatoj ricevis inviton por favore deklari sin pri Esperanto.
- Wim De Smet:
vizitis la tagon de APE en La Louvière;
vizitis la kulturan festivalon en Hungario kaj tie prelegis pri lingvaj problemoj.
- La estraro konstatis kaj ekstudis problemojn kiel Sonorilo-n kaj Monato-n.
- Funkcias:
la revuoj;
la E-centro;
la eldonejo.
- Planoj:
studotago por volontuloj je la 19a de oktobro;
honori S-ron Grégoire Maertens.

**4. Esprimo de opinioj pri tiu funkciado**
Ghislain Jacobs: "Bonajn tekstojn ni bezonas, mi aprobas!"
Ivo Durwael: "Regularo necesas, sed simpla! Regularo estu tre konciza, por ke oni ne forgesu la regulojn."
Respondo de Wim De Smet: "Regi estas antaŭvidi: se oni ne scias kiel agi, oni perdas tempon."

**5. Akcepto de novaj grupoj kaj de kunlaborantaj asocioj**
La SEL-grupo de Tienen deziras kunlabori kun FEL. Ni akceptas kaj aplaŭdas. Ili rajtas indiki administranton.
Ekzistas 2 grupoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas al FEL: Peer kaj Zonhoven.
Pri Zonhoven ni ne havas novaĵojn. Por Peer ĉeestis Henri Schutters.
Por solvi la problemojn en Limburgo, FEL provizore akceptis la membrojn de '94 kaj publikigis la programon de la grupoj en Horizontaal. Sed estas evidente, ke oni ne povas labori kiel individuoj, bona organizado demandas regulojn.
Dum la venonta kunveno (en septembro) de la klubo de Peer, ili pridiskutos la aferon. Se la klubo volas aliĝi en 1995, FEL bezonas la membroliston, la regularon kaj la nomon de la administranto.
La administrantoj interkonsentis, ke tiam la estraro de FEL akceptos la grupon de Peer.

**6. Novaj administrantoj**
FEL akceptas grupojn. La loka grupo rajtas indiki administranto(j)n.
En Limburgo estiĝis problemo ĉar LEL (Limburga Esperanto-Ligo) ne estas antaŭvidita en la statutoj de FEL. Oni fondis LEL pro la kunlaboro en Limburgo, ĉar la grupoj estas malgrandaj. FEL aprobis tion.
Kelkaj grupoj/membroj en Limburgo ne akceptas LEL. Restas do 2 demandoj:
- ĉu oni devas aliĝi al LEL por esti membro de FEL aŭ ne?
- kiom da membroj grupo minimume havu?
LEL kunvenos, eventuale kun la estraro de FEL, por klarigi la situacion, nepre antaŭ la 1a de decembro, por ke oni povu bone funkcii en 1995.

**7. Regularo pri la funkciado de la administrantaro kaj de la estraro**
Wim De Smet preparis tekston, sed ĝi ankoraŭ ne estas preta pro la amplekso. Wim De Smet kaj Johan Van Eenoo daŭrigos la laboron.
La teksto estos ricevota dum la venonta administrantarkunsido.
Sciinde estas, ke administrantoj, kiuj ne povas ĉeesti kunvenon, povas transdoni la voĉdonrajton al alia administranto.

**8. Deziroj kaj proponoj de la administrantoj**
* Ghislain Jacobs: dediĉi iom pli da tempo al la kunsidoj por interŝanĝi ideojn;
Ivo Durwael: antaŭvidi 1/2 de la tempo por la tagordo de la estraro kaj 1/2 de la tempo por la administrantoj;
* Georges Sossois: pli frue prepari la balotadon kaj formi premgrupon;
* Wim De Smet: honori S-ron Grégoire Maertens, ĉar li multe faris por Esperanto, li dum 6 jaroj prezidis UEA kaj li en tiu ĉi jaro estas 70-jara.
La solено okazos en Bruĝo, en novembro. La administrantoj akceptis S-ron G. Maertens kiel honoran membron.





## Organigramo

### FEL

**ESTRARO**
Prezidanto: Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel.: (03) 440.30.92
Vicprezidanto: Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.99.49
Sekretario: Johan Van Eenoo
Stationsstraat 27, 8380 Lissewege
Tel.: (050) 54.40.03
Vicsekretario: Marc Cuffez
Elisabethlaan 295, 8400 Oostende
Tel.: (059) 80.85.17
Kasisto: Flory Witdoeckt
Witte-Nonnestraat 9A, 8400 Oostende
Tel.: (059) 70.29.14
Anoj: Henny De Ketelaere
Miroeusstraat 26, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.15.67
Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (011) 22.59.12 (laborejo)
Walter Vandekieboom
Witte-Nonnestraat 9A, 8400 Oostende
Tel.: (059) 70.29.14

**HONORA KOMITATO**
Emile Cortvriendt (+)
Gérard Debrouwere (+)
Cesar Vanbiervliet (+)
Fernand Roose
Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge
Tel.: (050) 34.30.61
Edward Symoens
Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.62.66
Jules Verstraeten
Sint-Bernardsestw. 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43
Grégoire Maertens
Prins Leopoldstraat 51, 8310 Brugge
Tel.: (050) 35.49.35

### GRUPOJ

**ANTVERPENO**

**La Verda Stelo**
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Prezidanto: Jacques Schram
Hof Ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.86.02
Honora Prezidanto: Jules Verstraeten
Sint-Bernardsestw. 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43
Vicprezidanto: Henny De Ketelaere
Miroeusstraat 26, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.15.67
Sekretario: Lydia Kerremans
Verberdestede 60, 2870 Liezele
Tel.: (03) 899.34.92
Kasisto: Clara Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel.: (03) 440.30.92
Anoj: Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel.: (03) 440.30.92
Cor van Ekelenburg
Korte Van Sterbeeckstr. 7, 2060 Antwerpen
Edward Keusters
Eikenlei 15, 2930 Brasschaat
Tel.: (03) 645.46.60

**La Erikejo**
Douglaslaan 14, 2950 Kapellen

Prezidanto: Mireille Storms
Douglaslaan 14, 2950 Kapellen
Tel.: (03) 666.83.19
Vicprezidanto: Jorg De Mulder
Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.95.98
Sekretario: Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.83.19
Kasisto: Erhard Boehme
Plantinlaan 10, 2940 Stabroek
Tel.: (03) 664.40.47

**BRABANTO**

**Esperanto 2000**
Rue René Ménada 44, 1320 Hamme-Mille

Prezidanto: Frans Croon
Laarstraat 56, 1910 Nederokkerzeel
Tel.: (016) 65.59.44
Vicprezidanto: Bert Vanhoven
Van Montstraat 56, 3000 Leuven
Sekretario: Roger Goris
Rue René Ménada 44, 1320 Hamme-Mille
Tel.: (010) 86.01.12
Kasisto: André Wollants
Maleizenstraat 86, 3020 Herent

Tel.: (016) 23.74.18
Anoj: Ghislain Jacobs
Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo
Tel.: (016) 65.59.44
Marc Vanden Bempt
Duisburgstraat 12, 3001 Heverlee
Tel.: (016) 20.14.53
Martin Decaluwe
Grensstraat 69, 3010 Kessel-Lo
Tel.: (016) 25.96.12

**LIMBURGO**

**Limburga Esperanto-Ligo (LEL)**

Prezidanto: Jos Vandebergh
Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.19.43
Sekretario: Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (011) 22.59.12 (laborejo)
Kasisto: Albert Claesen
Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek
Tel.: (011) 32.36.03

**Beringen**

Prezidanto: Jos Lemmens
Maasheidestraat 7, 3580 Beringen
Tel.: (011) 42.26.36
Sekretario: Theo Geerdens
Schomstraat 53, 3582 Beringen-Koersel
Tel.: (011) 43.30.78
Kasisto: Theo Geerdens
Schomstraat 53, 3582 Beringen-Koersel
Tel.: (011) 43.30.78

**Hasselt**

Prezidanto: Marcel Aerts
Lazarijstraat 122, 3500 hasselt
Tel.: (011) 32.36.03
Vicprezidanto: Peter Berx
Havemarkt 39 bus 7, 3500 Hasselt
Tel.: (011) 23.30.93
Sekretario: Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (089) 41.80.95
Kasisto: Albert Claesen
Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek
Tel.: (011) 32.36.03
Ano: André Cuyvers
Heuvelstraat 2, 3941 Eksel
Tel.: (011) 73.18.01

**Houthalen**

Prezidanto: Jos Vandebergh
Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.19.43
Vicprezidanto: Leon Geysmans
Lariksenstraat 13, 3530 Houthalen
Tel.: (089) 38.17.77
Sekretario: Alfons Lijnen
Grote Baan 156, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.20.74
Kasisto: Alfons Lijnen
Grote Baan 156, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.20.74

**OKCIDENT-FLANDRUJO**

**Paco kaj Justeco**

Prezidanto: André Dumarey
Blekerijstraat 32, 8310 Brugge-Assebroek
Tel.: (050) 35.48.13
Sekretario: Oliva Van Eeghem
Torhoutsteenweg 31, 8200 Sint-Andries
Kasisto: Gregoire Maertens
Prins Leopoldstraat 51, 8310 Brugge
Tel.: (050) 35.49.35

**La Konkordo**

Prezidanto: Jean Pierre Allewaert
Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk
Tel.: (056) 20.07.96
Sekretario: Piet Glorieux
Werkenstraat 56, 8610 Werken
Tel.: (051) 56.90.30
Kasisto: Danielle Demeyere
Winterland 23, 8501 Heule
Tel.: (056) 35.55.35

**La Konko**
Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende

Prezidanto: Raymond Wylleman
A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.27.08
Vicprezidanto: Flory Witdoeckt
Witte-Nonnenstraat 9A, 8400 Oostende
Tel.: (059) 70.29.14
Sekretario: Marc Cuffez
Elisabethlaan 295, 8400 Oostende
Tel.: (059) 80.85.17
Kasisto: André D'Hulster
Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende
Tel.: (059) 80.06.95



**Knokke**

Prezidanto: Albert Marmenout
Helmweg 7, 8300 Knokke-Heist
Tel.: (050) 60.55.35

**ORIENT-FLANDRUJO**

**La Pioniro**

Prezidanto: Mari-Roza De Wolf
Botermelkstraat 100, 9300 Aalst
Tel.: (053) 78.26.04
Sekretario: Hugo Dossche
Asserendries 103, 9300 Aalst
Tel.: (053) 70.17.89
Kasisto: Clement Amant
Brakelstraat 52, 9300 Aalst
Tel.: (053) 21.31.56

**La Progreso**

Prezidanto: Katja Lödör
Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge
Tel.: (09) 230.16.77
Vicprezidanto: Patrick Haerick
Zilverberklaan 25, 9032 Wondelgem
Tel.: (09) 227.02.15
Sekretario: Ingrid Lievens
Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker
Kasisto: Hans Delnat
J. Lambrechtstraat 8, 9000 Gent
Tel.: (09) 221.10.02

**Flandra Esper. Junulara Asocio (FLEJA)**
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Prezidanto: Jorg De Mulder
Marnixplaats 10, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 666.95.98 (semajnfine)
Vicprezidanto: Bart Demeyere
Drift 26, 8420 Wenduine
Tel.: (03) 240.88.61 (oficHore)
Sekretario: Stefaan Cottenier
Veldstraat 49, 3001 Heverlee
Tel.: (016) 20.77.98
Kasisto: Wim Slootmans
J. Moretuslei 74A (G), 2610 Wilrijk
Tel.: (03) 820.24.54
Redaktoro JEN: Ilja De Coster
Varendrieskouter 47, 9031 Drongen
Tel.: (09) 227.86.64
Komitatano de TEJO:
Jorg De Mulder
Marnixplaats 41, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 666.95.98 (semajnfine)

**ADMINISTRANTOJ DE FEL**

***DELEGITOJ***

**ANTVERPENO**

**La Verda Stelo**

Jules Verstraeten
Sint-Bernardsestw. 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43
Henny De Ketelaere
Miroeusstraat 26, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.15.67
Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel.: (03) 440.30.92
Edward Keusters
Eikenlei 15, 2930 Brasschaat
Tel.: (03) 645.46.60

**La Erikejo**

Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.83.19

**BRABANTO**

**Esperanto 2000**

Ghislain Jacobs
Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo
Tel.: (016) 26.19.63
Frans Croon
Laarstraat 56, 1910 Nederokkerzeel
Tel.: (016) 65.59.44

**LIMBURGO**

**Limburga Esperanto-Ligo (LEL)**

Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (011) 22.59.12
Theo Geerdens
Schomstraat 53, 3582 Beringen-Koersel
Tel.: (011) 43.30.78
Jos Vandenbergh
Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.19.43
Jan Bovendeerd
Veenmosstraat 3, 3650 Lanklaar
Tel.: (089) 65.95.82

**OKCIDENT-FLANDRUJO**

**Paco kaj Justeco**

Johan Van Eenoo
Stationsstraat 27, 8380 Lissewege
Tel.: (050) 54.40.03

**La Konkordo**
Piet Glorieux
Werkenstraat 56, 8610 Werken
Tel.: (051) 56.90.30

**La Konko**
Marc Cuffez
Elisabethlaan 295, 8400 Oostende
Tel.: (059) 80.85.17

**ORIENT-FLANDRUJO**

**La Progreso**
Katja Lödör
Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge
Tel.: (09) 230.16.77

**FLEJA**
Wim Slootmans
J. Moretuslei 74A (G), 2610 Wilrijk
Tel.: (03) 820.24.54

***KOOPTITOJ***
Piet Glorieux
Werkenstraat 56, 8600 Werken
Tel.: (051) 56.90.30
Gerd Jacques
Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficHore)
Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
Tel.: (050) 33.00.04
Jacques Schram
Hof Ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.86.02
Walter Vandekieboom
Witte-Nonnenstraat 9A, 8400 Oostende
Tel.: (059) 70.29.14
Flory Witdoeckt
Witte-Nonnenstraat 9A, 8400 Oostende
Tel.: (059) 70.29.14

***FUNKCIULOJ***
Red. Monato Paul Peeraerts
Baron Dhanislaan 13, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficHore)
Red. Horizontaal Guido Van Damme
Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficHore)
Red. Vertikale Cor van Ekelenbrug
Korte Van Sterbeeckstr. 7, 2060 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficHore)

**KUNLABORANTAJ ASOCIOJ**

**Belga Esperanto-Federacio (BEF)**
Rue des Glacières, 6001 Marcinelle

Prezidanto: Georges Sossois
Rue du Basson 79, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.62.05
Vicprezidanto: Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.99.49
Sekretario: Philippe Van Damme
Rue du Brillant 21, 1170 Brussel
Tel.: (02) 673.75.96
Kasisto: Marcel Delforge
Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.14.13

**Association pour l'Esperanto (APE)**
Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle

Prezidanto: Georges Sossois
Rue du Basson 79, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.62.05
Sekretario: Roger Destabelle
Avenue Brunard 2, 6220 Fleurus
Tel.: (071) 81.25.48
Kasisto: Marcel Delforge
Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.14.13

**Belga Esperantista Fervojista Asocio (BEFA)**
Lucien De Sutter
Frère Orbanstraat 210, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.18.25

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)**
Raymond Wylleman
A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.27.08

**Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj**
Hubert Audenaert
Beekstraat 6, 9160 Lokeren
Tel.: (09) 348.44.56

**Skolta Esperanto-Ligo - Belgio (SEL)**
Prezidanto: Arie Bouman
Driesdreef 8, 9030 Mariakerke
Tel.: (09) 227.48.41
Sekretario: Nico Boon
Merelhof 8, 3300 Tienen
Tel.: (016) 81.52.46





Georges Sossois: deziris la saman por BEF - decidota dum la ĝenerala kunveno en Antverpeno, la 15an de oktobro.

**10. Diversaĵoj**

* Marcel Delforge: okazos la ĝenerala kunveno de APE en Charleroi, la 1an de oktobro, je la 14h en la kulturdomo, en la centro de la urbo. La administrantoj de FEL estas invititaj, ĉar pli da kontaktoj estas dezirindaj!

* Wim De Smet: ĉar la administrantoj de FEL estas membroj de BEF, ili prefere ĉeestu la ĝeneralan kunvenon de BEF, la 15an de oktobro en Antverpeno.

* George Sossois: la statutoj de BEF ŝanĝiĝis, sed estas ankoraŭ diskuteblaj; ne nur FEL kaj APE, sed ankaŭ Bruselo apartenas al BEF.

* Ghislain Jacobs: la uzo de la stelo.
Wim De Smet: ni jam dediĉis horojn al tiu problemo kaj nur denove pritraktos ĝin, se 1/2 de la administrantoj demandas tion.

* Ghislain Jacobs: atingi parlamentanojn por Esperanto.
Wim De Smet: estas strategio, kiun ni unue devas bone ellabori.

* Ghislain Jacobs: limigi la partoprenprezojn de la kursoj.
Paul Peeraerts: ekzistas rekomendo de FEL pri la prezoj.

Protokolis Ingrid Lievens.

---

**Estraro, 94.11.20**

Kunveno de la 20a de novembro 1994 en Antverpeno.

Ĉeestis: Wim De Smet, Roland Rotsaert, Ivo Durwael, Ingrid Lievens.
Pardonpetis: Johan Van Eenoo, Paul Peeraerts, Ivo Durwael anstataŭas.
Ne sukcesis veni: Alex Humet.
Komenco: 14.30a h.
Fino: 19a h.

**1. Tagordopunktoj**
Wim De Smet bonvenigas la novan estraranon, Ivo Durwael, kiu anstataŭas Jacques Schram.

**2. Raporto pri la estrarkunsido de la 15a de oktobro 1994**
Korektoj:
2.a) ellasu
6. ... akceptataj kaj la <u>nova adaptita</u> regularo aprobiĝas.
12. S-ro Vandebergh <u>insistas</u>, ke la sumo ...
16. Vertikale: - <u>Jorg</u> De Mulder ...
- <u>37</u> respondoj ...
17. ... la Turist-centron en Bydgoszcz, <u>la E-grupojn</u> de Sankt-Peterburgo ...
(Krom kelkaj lingvaj eraroj.)
Nova raporto ne necesas.

**3. Rerigardo al freŝdataj FEL-aktivaĵoj**
19/10: Tago por volontuloj:
Ne multaj ĉeestis, sed estis instrua tago. Ingrid Lievens faris raporton, oni kopios ĝin por la centro kaj por la Komisiono pri Instruado.
06/11: Bruĝo:
Ekspozicio Memling: ±20 ĉeestantoj; bedaŭrinde mankis la tempo por traduki ĉiujn klarigojn en Esperanton.
Administrantarkunsido: Komencis malfrue (14.15), tiel nur restis 15 minutoj por la ĉefa punkto: la Regularo pri la Administrantoj. Pro demandoj kaj diskutoj oni mankigis la okazon por aprobi ĝin. 14 administrantoj ĉeestis.
Ĝenerala kunveno: estis nur pluraj demandoj.
Honorigo Grégoire Maertens: ĝenis, ke la salono ne estis nur por ni. Dankon al Johan Van Eenoo, Roland Rotsaert kaj la bruĝa grupo, kiu organizis.

**4. Envenintaj korespondaĵoj**
- Kultura ambasadoro (Roland Rotsaert): mankas regularo; la titolo estas por unu jaro.
- BEF sendis leteron de iu franca persono kiu demandas pri verkoj de G. Simenon en Esperanto kaj pri belgaj Esperantistaj kantistoj (Nicole Pairoux kaj flandra duopo). Ivo Durwael respondis.
- Informkunveno la 7an de decembro en Wemmel pri 'volwasseneneducatie': klarigoj pri eŭropaj projektoj.
- Brazilano, kiu estis en Hungario, demandas helpon pro malfacilaĵoj kun vizo kaj deziras tranokti kaj gajni monon laborante. La letero tro malfrue atingis Wim De Smet: telefonu se estas urĝe.

**5. Konsiloj fare de la komisionoj**
- La Komisiono pri Informado kunsidis la 18an de novembro. Fakte FEL bezonas strategion.
- La Komisiono pri Financoj ne kunsidis la 10an de novembro pro malsano de Paul Peeraerts.
- La 3an de decembro okazos diskuto pri la eldonaĵoj (Monato). La estraro findecidos.
- La Komisiono pri Instruado ĝis nun ne funkciis. Wim De Smet: Se antaŭ la fino de la jaro la komisiono ne funkcias kaj kunvenis, alia persono transprenos la respondecon post la 1a de januaro. Pro la fakto, ke estas nur 1 respondeculo, la komisiono ne povas esti konsistigata.

**6. Administrantaro**
2/3 de la administrantoj ĉeestis en Bruĝo. Wim De Smet konsultis leĝon, manlibron, statutojn, sed ne enestas, ke minimume 1/2 de la administrantoj devas ĉeesti aŭ esti reprezentataj de aliaj administrantoj por decidi.
Tamen ne taŭgas se tro malgranda grupo rajtas decidi. Do okazos nova kunsido en Bruselo je sabato la 10a de decembro.
Ivo Durwael rimarkas, ke pli bone estas havi apogon ol esti kun sufiĉe da personoj. Roland Rotsaert opinias, ke Wim De Smet serĉas problemojn kaj tial faras novan regularon.
Wim De Smet insistas pri tuta klareco en la regularo.

**7. Esperanto-kursoj**
- Antverpeno: Ivo Durwael faris resumon pri la diskuto en Antverpeno (vidu la tekston). Venis pli da lernantoj, sed la 3a jaro estas problemo.
Estas la sola kurso en Flandrujo, kiu donas diplomon, do ne estas nur la respondeco de la instruistoj kaj de La Verda Stelo, sed ankaŭ de FEL.
Ni konsentas, ke FEL subtenu la propagandon (ekz. afiŝoj) kaj montru intereson por la kurso (ekz. ĉeesto de la prezidanto de FEL dum la disdono de la diplomoj).
- Bruĝo: komenciĝis kurso, sed ne estis novaj lernantoj.
- Gent: estas malpli da lernantoj en la 1a jaro ol kutime, sed la 2a jaro estas sukceso.
- Kalmthout: kurso komenciĝis, sed sen sukceso.
- Aalst: ne estas kurso.
- Hasselt: kurso komenciĝis.
- Venis letero el Hasselt por deklari (laŭ la konsiloj de FEL), ke Peter Berx kapablas instrui Esperanton. Ivo Durwael skizas la historion pri la reguloj.

**8. Sonorilo**
Iras al leĝa solvo: G. Maertens kunvokis la membrojn de la asocio Sonorilo por decidi, la 3an de decembro, pri la estonteco de Sonorilo.
Wim De Smet faris sugestojn.
Roland Rotsaert rimarkas, ke ni ne konas la problemojn de Sonorilo, kaj ke eblas konsulti la dosieron de Sonorilo en la juĝejo.
Ivo Durwael: Sonorilo ne estas ligita al FEL, APE aŭ UEA kaj intertempe ekzistas eldonejo + libroservo kiuj bone funkcias.
Wim De Smet: Sonorilo havas propran rolon.

**9. Revuoj**
- Horizontaal: revenis 37 enketoj. Ingrid Lievens faros raporton por la venonta numero. Poste oni pritraktos la ideojn en la komisiono.
Roland Rotsaert: En Horizontaal devus aperi nederlandlingve resumo de la decidoj de la estraro. La administrantoj devas ricevi plenan raporton.
- Ivo Durwael: 'Informilo' enhavis la raportojn + kelkajn interesajn informojn. Poste Vertikale estus ilo por interŝanĝi informojn, ideojn de grupo al grupo. Sed ĝi bezonas redaktoron!
Roland Rotsaert: Jen laboro por volontulo.
Decido: provizore Ivo Durwael respondecos, sed li nur kopios, ne tajpos.
- Monato: generala diskuto je 3/12, posttagmeze.

**10. Batos**
Venis letero el Houthalen, sed ne taŭgas por la librotenado. Se la afero enordiĝas, ni pagos.

**11. Ĉina ekspozicio**
Estas bone organizita.
Ostendo: 28-29-30/11; Flory Witdoeckt respondecas. Malfermo en la Feestpaleis, Wapenplein, lundon 28/11 je la 15a.





Antverpeno: (2)-3-4-5-6-7/12 en la Esperanto-domo.
Oni invitos la ambasadoron, ĵurnalistojn kaj interesitajn asociojn.
FEL ne respondecas pri ŝtelado, difektoj ktp.

**12. Neŭtraleco de FEL**
Venis letero kaj aliaj plendoj pro artikoloj pri neŭtraleco en Horizontaal aŭ afiŝoj en la Centro, kie FEL ne estis neŭtrala. (Samtempe aliaj petas politikajn agojn de FEL.)
Wim De Smet: FEL jam faris aliajn aferojn ol la celoj en la statutoj permesas, kaj tio povas kaŭzi problemojn!
Ivo Durwael: Se Esperanto volas ŝanĝi ion en la mondo (kaj kiu nur por la lingvo aktivas?), sed oni ne rajtas paroli pri tio kaj tio... Pli bone iom da diskuto kaj fajro en la movado, Esperanto estas ilo por plibonigi la homajn rilajtojn.
Wim De Smet: En la statutoj, art. 3 troviĝas: "*De vereniging is beslist neutraal met betrekking tot alle onderwerpen die geen rechtstreeks verband houden met de doelstellingen van de vereniging. D.m.v. de vereniging of in haar schoot mag geen propaganda worden gemaakt die niet conform haar doelstellingen is.*" Estas dezirata komunikigi tion.

**13. Pariza kongreso**
Konkretiĝas. Ĉu ĉiuj eŭropaj asocioj respondecas? (BEF estas la landa asocio!).
Ivo Durwael: Por komuna kongreso devas esti kontrakto.
FEL ne kunvenos en Parizo, sed donos informojn al la membroj.

**14. UN 50-jara**
La Flandra Komunumo invitas al "Informatie en kennis verspreiden over de doelstellingen van de VN".
Oni devas agi antaŭ la 30a de oktobro 1995, sed fari proponon antaŭ la 30a de majo.
Pripensindaj ideoj:
- verki broŝuron kaj disdoni ĝin en Tampere;
- programo pri UN en la lokaj grupoj;
- inviti spertulon el alia lando por fari prelegvojaĝon;
- ...

**15. Kunlaboro kun orienta Eŭropo**
Projekto de la Flandra Komunumo: per la organizaĵoj kontribui al ekonomia kaj socia evoluo en tiuj regionoj.
Wim De Smet skribis al:
- la Zamenhofcentro en Byalistok;
- la Turisma Centro en Bydgoszcz;
- la Esperantodomo en Sankt-Peterburgo.
Aliaj ideoj:
- eldoni ekonomikan vortaron;
- instruado.

**16. Kontaktoj kun gravuloj - Kiu konas kiun?**
Malmultaj respondoj venis.
Wim De Smet sendis la tekston de sia prelego (Hungario) al kelkaj gravuloj.
Respondis J.-L. Dehaene kaj W. Martens.

**17. FEL-kotizoj**
La lokaj grupoj ricevos 250 BEF de la kotizo kaj FEL 350 BEF. Sed por la junuloj la lokaj grupoj ricevos 150 BEF, por ke FLEJA ricevu 250 BEF!

**18. Reprezentado en kulturaj konsiloj**
Por la provinco, Wim De Smet estos reprezentanto kaj Alex Humet anstataŭanto. Por la urbo, la reprezentanto devas esti loĝanto de Antverpeno. Ĉu La Verda Stelo solvos?

**19. Antverpeno '95**
La faldfolio estas preta: la urbo donacis, FEL nur devas disdoni. La gvidantoj laboros senpage.

**20. UEA-komitatano**
Ne urĝas (antaŭ julio). Ni bezonas personon, kiu regule iras al kongresoj kaj volas ĉeesti la kunsidojn; kaj kiu scias pri la funkcio de UEA.

**21. Novaj metodoj de komunikado**
Roland Rotsaert volontulas por ellabori la sistemon BBS, sed prefere persono el Antverpeno prizorgu ĝin.

**22. Rilatoj kun la nederlanda E-movado**
Roland Rotsaert ĉeestis kunsidon de Esperanto Nederland (EN) kaj faris raporton. En Nederlando nur malmultaj konas "Horizontaal"-n, sed oni interesiĝas pri komuna revuo, ekde januaro 1996.
Roland Rotsaert proponas enmeti infor-

mojn pri la nederlandaj grupoj en Horizontaal kaj invitis la EN-estraron al la venonta ĝenerala kunveno de FEL.

**23. FEL-estraro 1995**
Roland Rotsaert proponas serĉi personon por transpreni la taskon de kasisto, ĉar li daŭrigos nur dum 1 jaro.

**24. Venonta estrarkunsido**
Dimanĉon, la 18an de decembro, je la 9.30a en Antverpeno.

**25. Diversaĵoj**
- La Progreso, Gent konstatas, ke ofte homoj neniam aŭdis pri Esperanto. Tiam la grupo konsideras partoprenon en la 'Internationale Jaarbeurs van Vlaanderen, 9-24 sept. 1995'. Ĉu FEL povas subteni la iniciaton pere de mono kaj materialo?
Respondo: La afero koncernas la novan estraron; la komisionoj povas konsili.
En la estinteco oni spertis, ke partopreno en borsoj demandas grandajn elspezojn kaj preskaŭ ne donas rezultojn. Aliflanke estus okazo por havi novan standmaterialon.
- Roland Rotsaert: propono de H. Deceuninck pri laboro por librotenisto. Kaŭzos problemojn doni tiun gravan laboron al tia "volontulo"!
- Respondo de 'Vlaams Studie- en Documentatiecentrum': ne estas utila por ni.

Protokolis Ingrid Lievens.

---

**Komisiono pri Informado, 94.11.19**

La dua kunveno de la Komisiono pri Informado je la 19a de novembro 1994, inter la 10.30 kaj 13.00 h en la Esperanto-centro.

Ĉeestis ĉiuj komisionanoj: Annie Bollaert, Wim De Smet, Ivo Durwael, Eddy Raats kaj Edward Symoens.

**1. Antaŭa protokolo**
Akceptiĝas. Necesas korekti la nomon de Eddy Raats (Raats anst. Raets).

**2. Motivoj por Esperanto**
Wim De Smet faris al ĉiuj jenajn demandojn, kiujn ni respondu en maks. 5 min:
a) Kiel mi eksciis pri Esperanto?
b) Kial mi lernis Esperanton?
c) Kiel mi lernis?
ĉ) Kio motivis al aktiva rolo en la movado?
d) Kial mi akceptis rolon?

Wim De Smet
a) En lerneja tempo i.a. pro prelego de Hector Vermuyten.
b) Pro bezono pri nomenklaturo-lingvo.
c) Surŝipe de Sud-Afriko al Antverpeno per memstudado.
ĉ) Interesiĝo pri internaciaj kontaktoj kaj esploreblecoj.
d) Mi ŝatas organizi.

Edward Symoens
a) Per la patro, kiu serĉis lernanton por kurso de Braet.
b) Pro deziro de mia patro.
c) En kurso de Braet.
ĉ) Ĉar mi estas sociema kaj ŝatas studi lingvojn.
d) Mi volas resti aktiva.

Eddy Raats
a) Delonge sciis pri ekzisto de Esperanto, sed ne memoras kiel.
b) Ĉar mi estas sociema kaj suferis pro lingvaj problemoj.
c) En kurso de fam. De Schepper.
ĉ) Mi partoprenas por praktiki Esperanton.
d) Pro agrablaj spertoj.

Ivo Durwael
a) Pro mencio de pli aĝa frato.
b) Pro malemo studi plurajn lingvojn.
c) En 30-hora kurso de Rik de Roover.
ĉ) Internaciaj kontakteblecoj.
d) Stimulo kaj aprezo de aliaj esperantistoj.

Annie Bollaert
a) Eksciis pri Esperanto kiam 23-jara.
b) Decidis aktivi por trarompi solecon.
c) ?
ĉ) Malfermiĝis nova mondo kun facilaj kontaktoj.
d) Mi deziris pli partopreni kaj kontribui.

Wim De Smet konkludas, ke la celo de la komisiono estu okupiĝi pri manieroj por





stimuli homojn por eklerni kaj ekapliki Esperanton. Ni lasu la ĝeneralan strategion al la estraro.

Komunaj trajtoj en nia malgranda enketo estis:
- hazardo en la ricevo de informoj;
- deziro je sociaj, precipe internaciaj kontaktoj;
- interesiĝo pri lingvoj (por 4 el 5);
- hazardo en la disponigeblo de kursomaterialo.

Ĉu homoj ekaktivas, dependas de la karaktero de individuo kaj ankaŭ de la hazardo, ĉu en loka grupo troviĝas iu, kiu instigas al aktivado.

Eddy Raats atentigas, ke la supre menciitaj instigiloj validas por iu ajn asocio. La nura specifeco de Esperanto estas la internacieco kaj la specifeco de la lingvo.
La lingvolernado estas bremso por akiri novajn membrojn. Ankaŭ la populareco de la angla.
Ŝajnas inde, ke ni ekzamenu eblecojn por krei grupon de simpatiantoj kaj apogantoj, kiel ekz. kiam oni organizis peticiojn al Unesco kaj UN.

**3. Kiu konas kiun**
Wim De Smet alvokas al ĉiuj por pensadi pri renomaj personoj, kiujn ni laŭbezone povu alpaŝi. Li certas, ke multaj membroj forgesis mencii siajn influhavajn konatulojn.

**4. Esperanto en la gazetaron**
Ni ekzamenas la reeĥon de lastatempaj okazoj en la komunikiloj:
- honorigo Jules Verstraeten: mencio en Gazet van Antwerpen; unu paĝo en Het Nieuwsblad
- kongreso NBN: loka gazeto de Kalmthout; Het Volk; ATV (4 min.); Aank.blad.
- honorigo Maertens: neniu novaĵo
Eddy Raats konsilas verki tute pretan komunikon; kontrolos eltondaĵojn en sia oficejo; havigos la Jarlibron de Ĵurnalistoj; provos inviti ĵurnaliston por INSTRUKCII NIN.
Wim De Smet konstatas, ke la Esperanto-centro ne estas preparita al kontaktoj kun la gazetaro. Strategio de rilatoj kun la komunikiloj estas kroma tasko por la komisiono.
(Intertempe Eddy Raats jam havigis la Jarlibron de Ĵurnalistoj kaj informbroŝuron "Hoe de pers benaderen?" de Jos Huypens, ĉefredaktoro de Gazet van Antwerpen.)

**5. Celo de nia informado**
Ĉu ni konsideru Esperanton nur kiel lingvon aŭ kiel kontribuon al tutmonda paco, kiel elementon kontraŭ diskriminacio, kontraŭ rasismo aŭ por pli da solidareco inter la homoj ...?
Estas strategia demando, pri kiu okupiĝu la estraro.
Ivo Durwael atentigas pri la "Leitbild" de GEA, en kiu la estraro de GEA skizas sian rolon kiel ne nur prilingvan sed homaman, kaj okupiĝu pri maljustaĵoj en la intergentaj rilatoj.
Edward Symoens atentigas, ke ni uzu aŭ ne uzu tiajn argumentojn depende de la celgrupo al kiu ni direktas nin. La komisiono okupiĝu pri la strategio de informado, surbaze de la tekstoj, kiujn Edward Symoens verkis. Ni esploru kiu faru kion kaj kiel. Ni formulu konkretajn instrukciojn por la lokaj grupoj kaj por la Esperanto-centro, esploru kaj listigu la rezultojn kaj poste asistu la lokajn respondeculojn por plibonigi la rezultojn.

**6. Celgrupoj**
Wim De Smet invitas por listigi la eblajn celgrupojn.
Ĉe la fino de la kunveno notiĝis nur mezlernejanoj kaj lingvo-instruistoj, sed ĝis la venonta kunveno, ni kompilu liston de ĉiuj grupoj, kiuj estas interesaj por niaj informaj laboroj.

**7. Venonta kunveno**
La ĉeestantoj (krom Wim De Smet, kiu estis vokita alien) esprimas la deziron por organizi tuttagan kunvenon, kun la intenco akiri iun pretan labordokumenton kaj netan dividon de taskoj.
Ne interkonsentiĝis pri dato.

Fino de la kunveno: 13.00 h.

Protokolis Ivo Durwael

---

## LA BULONJA DEKLARACIO

Deklaracio pri Esperantismo

La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu "ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn" donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ciu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke LINGVO INTERNACIA povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj jarcentoj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivpova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de Lingvo Internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj, ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam delonge ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas "nenies propraĵo" nek en rilato morala, nek en rilato materiala.
Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu lingvo estos ciam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo Esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj la plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan.
La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo "FUNDAMENTO DE ESPERANTO" en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam pravigas sin per la vortoj "tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportuna esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la "Fundamento de Esperanto", ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas.
Apartenado al ia aktiva societo Esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

Ensendis Jacques Schram.

**LA DUA KONGRESO ESPERANTISTO, Ĝenevo 1906**

**"... El la timo, ke eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj utilaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, tiun ideon, kiu estas la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estas la stelo, kiu ĉiam gvidas ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan ...!"**

**El parolado de L. L. ZAMENHOF**